

CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 95**

N-RO 3 (71), APRILO 2016

Enhavo

| | |
|--|----|
| <i>Originala poezio</i> | |
| Vladimir Samodaj | 4 |
| Gennadij Ŝlepĉenko | 11 |
| Espopore | 12 |
| Tatjana Auderskaja. Kantoj de malgranda homo el malgranda Eŭropo, XX jc | 12 |
| Kanto de neeŭropa homo de XXI jc. | 8 |
| <i>Tradukita poezio el Esperanto al la rusa</i> | |
| Vladimir Samodaj tradukita de Ludmila Novikova | 6 |
| <i>Rememoroj</i> | |
| Vladimir Samodaj. Loĝejo | 9 |
| <i>Tradukita poezio el la rusa</i> | |
| Aleksej K. Tolstoj en traduko de G. Ŝlepĉenko | 11 |
| <i>Originala prozo</i> | |
| Svetlana Gasjuk. Makaronioj kaj brasiko | 15 |
| Esperpore. Feĉulo | 16 |
| <i>Historio</i> | |
| Anatolo Sidorov. Esperanto en la Ruĝa armeo | 18 |
| <i>Recenzo</i> | |
| Nikolao Gudskov. Kartvelio 1918-21 kiel nova mito pri “ora epoko” | 22 |
| <i>Ĉirkaŭ rido: skizo, poemo, ŝercoj</i> | |
| Vladimir Opletajev. La unua de aprilo | 26 |
| Klara Ilutoviĉ. Tago de rido | 27 |
| Iom por ridi, aŭ, almenaŭ, rideti | 28 |

Jubilee

Gratuloj al Vladumir Samodaj



La 10-an de aprilo Vladumir Samodaj, la aŭtoro de la koncepto de “Cerbe kaj kore” kaj ĝia kreinto kaj eldoninto (aŭ “modesta tajpanto”, laŭ sia propra difino) festis 60-jariĝon de sia esperantistiĝo. Gratulante lin okaze de la glora jubileo, ni publikigas ĉi tie kelkajn elektitajn de li mem poemojn kaj kelkajn – en rusigo far L. Novikova kun paralelaj tekstoj. Krome, estas publikigata peceto de liaj rememoroj pri sia vivo.

Originala poezio

KUNULOJ

Sur altaj', en stepo vasta
Du betuloj staras.
Evidente la beluloj
Tutan vivon paras.

Same altaj, same sveltaj,
Same blank-figuraj
Staras kune du amikoj –
Arboj bel-staturaj.

Branĉojn-brakojn plenkofide
Interplektis frate
Kaj murmuras, kaj susuras
Ame kaj amate.

Ilin same kun kareso
Flegas varma suno,
Ilin ambaŭ treme skuas
Frido de l' aŭtuno.
Ilin pare ĝis la tero
Klinas ĉiuj ventoj.
Ilin kune hard-elprovas
Ĉiuj viv-eventoj.

Tamen kial unu arbo
Estas verd-folia,
Sed kun flava foliaro
Oras la alia?

/02.1974.Bagdado/

POEZIO

Kio estas poezio?
Mi ne scias, kedu min.
Ĉu ĝi estas fantazio,
Aŭ enigmo sen difin'?

Ĉu kaŝludo intelekta,
Senelira labirint'?
Aŭ ĝi estas pado rekta
Al plej alta arta pint'?

Ĉu ĝi estas klara penso,
Atingebla por kompren'
De la hom' kun simpla menso,
Nekapabla por diven'?

Ĉu ĝi estas art' superba
Ŝirmi sencon de la vort',
Por poeta histo cerba
Estas nura lingva sport'?

Ĉu ĝi estas elokvento
De l' racia harmoni',
Aŭ kriado kontraŭ vento
Pro kaprico de l' mani'?

Estas multaj opinioj,
Tamen mankas determin',
Do stultuloj kaj genioj
Ĝin diskutas kun obstin'.

Mi ne scias. Mi ne volas
Min turmenti pri la tem'.
Mi modeste tute rolas
En la solvo de l' problem'.

Miaj versoj ne hipnotas
Per bombaste pompa rim'.
Mi nur simplajn vortojn notas,
Kiujn diktas la anim'.

/14.03.1994, Moskvo/

MI MEMORAS

Mi memoras pri vi, mi memoras...
Nin disigis la kruda destin'.
Mi ne veas, ne larmas, ne ploras,
Sed ne povas forgesi mi vin.
Mi memoras pri vi, mi memoras...

Vi nenion, nenion divenis,
Vi ne sciis pri mia delir'.
Kiam vi vian nupton festenis,
Preskaŭ krevis mi pro la sopir'.
Vi nenion, nenion divenis...

Pasis jaroj, jardekoj, jarcentoj...
Vi verŝajne jam iĝis avin',

Sed ne mortas en mi junaj sentoj,
Kaj ne povas forgesi mi vin.
Pasis jaroj, jardekoj, jarcentoj...

Vi tro foras de mi, vi tro foras...
La abismo plu kreskas sen ĉes',
Mi delonge pri vi ne angoras,
Sed ne venas la sava forges'.
Mi memoras, memoras, memoras...

Mi memoras...

/17.03.1994, Moskvo/

Tradukita poezio el Esperanto

V. Samodaj.

AŬTUNA SOMERO

Denove enmonde ekregis aŭtuno,
Sed mankas nun pluvo kaj brilas la suno,
Nur iel negaje la birdoj ĉirpetas:
Ĉu ili jam mornon proksiman profetas?

La arboj demetas la veston malprude

Kaj lasas ĝin fali ĉirkaŭ-apude,
Nur restas en sol', sin kroĉinte ĉe io,
Kaj tremas en tim' hezitema folio.

Jam kovras la teron tapiŝ' brune flava,
Jen ien saltetas paser' stulte brava,
Ĝin kato embuskas – gracia ĉasisto –
Kaj rampas al ĝi kun malica persisto.

Ĉiel' sin admiris en flaka spegulo,
Sed rompis la bildon kolombo flirtulo,
Komencis sin bani, purigi la plumojn –
Ĉu ĝi ja ne povis atendi la pluvojn ?

В. Самодай.

ОСЕННЕ ЛЕТО

Вот осень опять воцарилась на свете,
Но дождь не тревожит, и солнышко
светит,
Лишь птицы щебечут не так, как в
дни мая,
Наверное, хмурые дни предвещая.

Разделись деревья совсем уж
бесстыже,
Раскинув вокруг ворох огненно-
рыжий,
Листок одинокий, цепляясь в
смятеньи,
Дрожит от испуга, боится паденья.

Лежит под ногами ковёр красно-
жёлтый,
Вот скачет глупыш-воробей
беззаботный,
В засаде его поджидает охотник –
Крадётся неслышно мой кот – ох,
разбойник!

Любуется небо в зеркальности лужи,
Но голубь картинку разбил
неукложе,
В той луже чистюля решил

Flavruĝo kaj verdo, kaj blua ĉielo,
Kaj oro de l' suno – impono kaj belo !
En mez' de oktobro varmegas vetero :
Nin gasto vizitis – aŭtuna somero!

1993

EKVINTRIS

La gasto mirinda – aŭtuna somero –
Nelonge nin ravis kaj jam malaperis,
Sin sternis la neĝa kovril' sur la tero
Kaj vent' senkomplete la varmon
forpelis.

La arbojn ĝi brue kaj krude nun skurĝas,
Kaj plumojn hirtigas de l' birdoj
sendomaj.
Ho, kial renkonte al frostoj ĝi urĝas
Kaj muĝas kolere kun hurloj fantomaj ?

Ne kantas la birdoj. Ne vane do tiam
Kun tia malgaj' la etuloj ĉirpetis –
Profetis la povraj mizeron ja sian
Kaj pie indulgon ĉe Di' ili petis.

La kato ĉasisto en hejmo jam sidas
Kaj dorme murmuris en kat-maniero,
Ensonge ĝi tiun paseron nun vidas,
Post kiu embuskis dum varma vetero.

Finiĝis la varmo, kaj dum duonjaro
Nun regos ĉirkaŭe nur frostoj kaj neĝo.
Tutvintre suferos malsata bestaro

искупаться –
Сезона дождей не мог что ли
дождаться?

Багряность, лазурного неба обличье,
И золото солнца – краса и величие!
Октябрь на дворе, но не верится в это:
К нам в гости пришло настоящее
лето!

Traduko de Ludmila Novikova (2018)

ЗИМА НАСТАЛА

Осеннее лето, что бабьим зовётся,
Недолго ласкало теплом запоздалым,
И вот уже ветер неистовый вьётся
Над снежными окрестных полей
покрывалом.

Он хлещет свирепо по елям и клёнам
И пёрышки треплет пичугам
бездомным,
Несётся повсюду потоком студёным
Со свистом ужасным и воем
фантомным.

Пернатые смолкли. Пришло
пониманье,
Зачем они грустно тогда щебетали –
Ведь крохи вешали о близком
страданье,
От Бога смиренно спасения ждали.

А кот-птицелов дома к печке всё
жмётся
И сладко мурлычет в уютной
дремоте.
Во сне он за тем воробьём вновь
крадётся,
Кого не поймал на осенней охоте.

Полгода зима будет всюду царица,
Мороз с ней трескучий и снег до
колена.

Kaj revos pri l' fin' de la blanka sieĝo.

1993

SORPO

Vintro. Vintro! Frua vintro
Nin vizitis sen invit'.
Al fenestra mia vitro
Sorpo frapas kun incit'.

En la ĉambrom ĝi rigardas
Kun petega kapoklin',
Plendas, ke la tempo tardas,
Ke mi hejmen prenu ĝin.

Ploras, ke la trunko frostas,
Branĉoj tremas pro la vent',
Ke por mi nenion kostas
La kompato kaj kunsent'.

Sidas mi en hejmo varma,
Teon trinkas en trankvil'.
Tamen ĝi kun veo larma
Petas min pri la azil'.

Ne kapablas ĝi kompreni,
Ke la arbo aŭ la hom'
Devas sian vivon treni
Nur en sia propra dom'.

Ke pereas ĉiu esto
En la fremda viv-medi',
En alies hejma nesto
Nin atendas tragedi'.

Do, ni vivu, kie vivas,
Kie plantis nin la sort' :
Mi laŭ mia fluo drivas,
Ĝi plu staru en la kort'.

И будут голодные звери и птицы
Мечтать о конце белоснежного плена.

Traduko de Ludmila Novikova (2018)

РЯБИНА

Ах, зима! Зачем так рано?
Неожиданный визит!
По стеклу оконной рамы
Вот рябина мне стучит.

Внутри заглядывает слёзно,
Ветви опустив без сил,
Жалуется, что уж поздно,
Чтоб я в дом её выпустил.

Плачет, что ей так простудно
Под холодным ветром быть,
Что ведь мне совсем нетрудно
Милосердье проявить.

Я сижу спокойно дома,
Пью горячий чай в тепле,
А она с рыданием снова
Просится под кров ко мне.

Как внушить ей, что не стоит
Заблуждаться никому.
Каждый должен жизнь построить
В своём собственном дому.

Что погибнет всякий сущий
В неродной ему среде,
Средь чужих, хоть в райской куще,
Непрерменно быть беде.

Жить нам всем, деревьям, людям,
Там, где жребий нам велит:
Мне шагать по перепутьям,
Ей – стоять там, где стоит.

Traduko de Ludmila Novikova (2018)

Rememoroj

Loĝejo

(fragmento el la nepublikigota libro «Bagateloj de l'vivo aŭ Kio estis – estis»)

Vladimir SAMODAJ

Decembre de la jaro 1966, ne fininte dume la studadon en la universitato, mi ekoficis en la Ministerio de la supera kaj meznivela speciala klero kaj ricevis postenon de supera inĝeniero en Apartemento pri studentoj, aspirantoj kaj staĝantoj el fremdaj landoj. Miaj taskoj estis solvi la problemojn, ligitajn kun la nomitaj kategorioj de la studentoj el 11 landoj, lernantaj tra la tuta Soveta Unio. Mi estas arabisto, sed inter la destinitaj por mi landoj estis nur unu araba – Norda Jemeno.

Tiutempe oni provis mobilizi min en aer-descendan trupon (ruse ВДВ) – mi ja estis gimnasto kaj bona pafisto, tamen ĉar la kapo doloris senĉese kaj okazadis kapturniĝoj, oni min ne rekrutis. Poste iu kolonelo ekvarbis min en la Komitaton de ŝtatekureco (КГБ), tamen mi sukcesis ne cedi pro la samaj kaŭzoj.

Kiam en 1963 mi faris vican stultajon - edziĝis, mi estis devigita ekloĝi ĉe la gepatroj de la edzino (antaŭ tio mi loĝis en studenta komunloĝejo). Ni loĝis kvarope en ĉambro je 16 kvadrataj metroj en triĉambra loĝejo, kie estis ankoraŭ du familioj. Baldaŭ post mia reveno el Jemeno, kie mi oficis dum 18 monatoj, naskiĝis nia filo, en aŭgusto 1965. Jam antaŭ tio ni loĝis ne tre vaste, sed nun jam estis tute dense. Viciĝi por ricevi loĝejon de la ŝtato ni ne povis, ĉar ni havis tro da loĝloko - tiutempe la ŝtato registris en la vico por loĝejo nur tiujn, kiuj havis ne pli ol 3 m² da spaco por unu persono, sed ni ja havis eĉ 3,20 m²!

Mia patrino, loĝinta en Odeso, decidis helpi. Ŝi skribis leteron al la Ĝenerala sekretario de Centra Komitato de Komunista partio de Soveta Unio (ЦК КПСС) kamarado Breĵnev, espriminte sian miron: Kio okazas? Nepo de revoluciulo, partopreninta la ribelon en la krozŝipo «Potjomkin», loĝas en tiaj kondiĉoj!

Mi ne sciis pri tiu iniciato de mia patrino. Oni invitis min al la vicprezidanto de Mossovet (Moskva Soveto – Gvidorgano de urbo Moskvo) kamarado Panov.

Ni pridiskutis la aferon. Li proponis, ke mi telefonu post semajno. Mi telefonis. Juna virina voĉo respondis:

- Kamarado Panov forestas. Kiu demandas?
- Samodaj.
- Ho, kamarado Samodaev ! Momenton !

Tuj oni trovis la forestantan kamaradon Panov. Evidentiĝis, ke la prezidanto de Mossovet kamarado Promislov havis kelkajn vicestrojn, la familia nomo de unu el ili estis Samodaev. Interesa koincido. Oni opiniis, ke mi estas li!

Rezulte mi kun la edzino kaj filo ricevis ĉambron kun la spaco 20 m² en triĉambra loĝejo. Tie loĝis ankoraŭ du familioj. En la oficiala respondo de Mossovet al mia patrino evidentiĝis, ke la patro de mia edzino estas filo de mia patrino, sekve li estas mia frato. Tre atentaj kamaradoj laboris en Mossovet! Tamen ne gravas - ekde nun ni loĝis ne tiom dense. Tamen unu ĉambron de la loĝejo okupadis ebruiula paro, kio estis tre maloportuna – ni ja havis malgrandan infanon...

Mi laboris en la Ministerio nur kvar monatojn. Tiutempe oni proponis al mi interpretistan laboron en la Supera komsomola lernejo ĉe Centra Komitato de komsomolo, diris, ke estas konstruata 4-etaĝa domo por la oficistoj de la Lernejo, promesis al mi loĝejon. Mi konsentis.

En la Lernejo studis gejunuloj el multaj landoj. Mi devis tradukadi en la araban lekcionj pri la sovetaĵ temoj – politika ekonomiko, historio de USSR, historio de la komunista partio, dialektika materialismo, ateismo kaj pluraj aliaj. Ofte mi laboris po 10-12 horoj tage. Inter miaj lernantoj estis homoj el Sirio, Jemeno, Sudano, Somalio. En la somalia grupo estis 6 personoj, al ili tradukadis tri traduklistoj: al la angla, itala kaj araba lingvoj ĉe unu instruisto, ĉar komunan lingvon ili ne havis.

La instruiston pri historio de komunista partio mi malbone komprenis ruslingve. Jen li prononcas longan frazon, multsignife ion desegnante en la aero per montrofingro. Ĉiujn vortojn mi komprenas, sed la sencon ne kaptas. Mi demandas:

- Kion vi deziras per tio diri?
- Nu kial do?

Kaj li ripetas la samon per la samaj vortoj kaj samaj gestoj. La vortojn mi povas traduki, sed kio pri la senco? Similan «elokventon» mi renkontis dum la tradukista laboro plurfoje.

La instruisto pri politika ekonomiko la plej komplikajn temojn klarigadis tiel kompreneble, ke la tradukado estis por mi eĉ agrabla, malgraŭ ke mi tiun laboron ne ŝatis. Kaj ĉiuj studentoj min bonege komprenis, ĉar komprenis mi.

Mi opiniis, ke la plej malfacilaj por tradukado estos lekcionj pri politika ekonomiko, sed tiuj estis historio de USSR kaj ateismo. Tro multas netradukeblaj terminoj. Multon necesis elpensi aŭ klarigi. Des pli ke rusa-araba vortaro tiutempe ne ekzistis. La praktiko estis serioza. Tamen plej malfacilis tradukado de filmoj, des pli nespektitaj antaŭe. Provu do sekvi la peripetiojn de la filmo, traduki ĉiujn parolojn, sen ion preterlasi. Ne eblas ! Do la tradukado estis fragmenta aŭ simple rakonta.

Se inter lekcionj estis paŭzoj, mi plenigadis ilin per tradukado de tekstoj al esperanto por la bulteno «Por la Paco», kiun eldonadis (neregule) Esperanto-komisiono. La bultenon faradis Konstantin Miĥajloviĉ Gusev, mi estis lia helpanto. Mia laboro en la komsomola lernejo daŭris 20 monatojn. Mi estis trompita – dum tiu tempo la loĝdomon oni eĉ ne komencis konstrui.

Mi ricevis proponon veturi por tri jaroj en Sirion, esti interpretisto en la Komerca reprezentejo (Торгпредство). Mi konsentis, esperante perlabori monon por kooperativa loĝejo.


Pro familiaj problemojn mi devis forlasi Sirion post 18 monatoj. La gajnita mono sufiĉis por aĉeti triĉambran loĝejon, en kiu ni ekloĝis septembre de la jaro 1970. Persone mi loĝis tie dum 44 jaroj...

P.S.

Nun mi loĝas en Belgio. Tio ne signifas, ke mi fuĝis el Rusio. Ekde la morto de mia filo en 1996 mi dum 18 jaroj loĝis sola. Miajn filinon kaj genepojn (три штуки) mi vidis tro malofte, do mi decidis fini la vivon apud ili. Se mi revenos Moskvon, mi ne plu ricevos vizon por Ŝengenujo.

Tiel statas la afer'...

Tradukita poezio



Острою секирой ранена береза...

Алексей Константинович Толстой

Ост рою секирой ранена береза,
По коре сребристой покатились
слезы;
Ты не плачь, береза, бедная, не сетуй!
Рана не смертельна, вылечится к лету,
Будешь красоваться, листьями
убрана...
Лишь больное сердце не залечит
раны!
1856

Per hakil' betulon vundis iu ulo...

Aleksej Konstantinoviĉ Tolstoj

Per hakil' betulon vundis iu ulo.
Gutas larm' el ŝelo, kiel el okulo.
Ho, betul', ne ploru, kaj ne plendu. Vere,
Resaniĝos via vundo, kaj somere
Vi aspektas bela en ornam' folia...
Sed ne resaniĝos nur korvundo via!

Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko

Originala poezio

Gennadij Ŝlepĉenko, Vladivostoko

* * *

Se grasan oston ĵetas vi al hundo,
Ne devas flati vi al via kor',
Ke ĝi je malavaro tre abundas.
Ne estas tio korfavor'.
Se vi dividas kun la hundo oston
Kiam vi mem suferas pro malsat',
Valoras via faro altan koston.
Jen estas vera karitat'.



* * *

Veinde kavas la vantega tru'
Kvazaŭ faringo sorta en la buŝo raba,
Rekonu vivon en silenta bru',
Konante morton en bruego samba.
Provante negi belon de la nokt',
Bonvolu ĉasi brilon de la karbo,
Vidante tagon sur mondbildo farba,
Eksentu ŝajnon de nokttaga lok'.
Atentu voĉon de la infanec',
Vivmortu hela kaj fantoma pec'
Ekster surteraj moroj kaj kutimoj.
Monaĥo, majstro, sklavo aŭ Cezar'?
'Ca nom? Ku sat-ci?' – 'Estams cheŭuŭ ĉuar!'
Bizara nubo en la mensaj limoj...



**Tie ĉi estas uzata la artprojektoj subnome Popido kaj Arkaika Esperanto fare de Manuel Halvelik*

Kantoj de malgranda homo el malgranda Eŭropo, XX jc



*Tatjana Auderskaja, Odeso,
Ukrainio*

I

Mi estas malgranda homo el malgranda Eŭropo.
Mi loĝas en malgranda, tamen ja propra domo,
Havas mi malgrandan salajron kaj familion grandan,
Kaj pro tiuj kialoj mi bone scipovas kalkuli:

Kiom kostas studado en la Universitato,
Kiom kostas manĝado, kiom – privata lernejo,
Kiom da mono restis sur mia konto en banko
Post la aĉeto de nova, tre bezonata aŭto;
Mi ja ne povas veturi al oficejo mia
Per tiu malnoviĝinta, de pasintjara modelo:
Mi perdos mian prestiĝon, oni min ne konfidos
Kaj ne plialtigos salajron, tiam el kio mi pagos
Krediton pro nova modelo de luksa polvosuĉilo?
Mi estas malgranda homo el malgranda Eŭropo,
Mi havas malgrandajn zorgojn en mia malgranda mondo.

¹ Evgenij Georgiev, Karaganda, Kazaĥio

Sed kiam fremdaj misiloj al nia lim' proksimiĝis,
Fariĝis glacie malvarma mia komforta hejmo
Kaj ne plu protektas muroj kontraŭ neŭtrona morto,
Kaj miaj malgrandaj zorgoj fariĝis unu grandega,
Unu grandega, komuna por ĉiuj loĝantoj de l' Tero:
Konservi nian planedon vivanta kaj verde-blua,
Konvena por ĉies vivo, por ia ajn vivo sur Tero.
Ne estos plu rusoj, francoj, nigruloj aŭ usonanoj –
Restos nur unu homaro, racia gento sur Tero,
Krono de la kreaĵo, ne ĝia pereiginto.

2

Nin informas gazetoj:
Hodiaŭ pereis tiom da,
Murditaj, pafitaj – tiom da,
Pendumigitaj – tiom da!
Kion ankoraŭ vi volas?
Sufiĉe, haltu, jam bolas
La Tero pro sang-inundo
Kaj skuas sin ĝis profundo:
Anstataŭ la lando – vundo
Sur la vizaĝ' de la Tero,
Anstataŭ prospero –
Mizero,
Kaj glata ŝtata malvero;
Jen gloras denove poetoj
La heroaĵon militan
Kun nobla celo faritan:
Honestan kaj senprofitan
Apogon al ŝtatoj etaj,
Tamen eksplodi pretaj
Kun tuta nia planedo,
De l' Homo freneza predo.
Mi timas, mi krias pro timo,
Ne volas mi esti viktimo;
Sed malgraŭ preĝoj kaj petoj
Plukreskas ruĝa makulo
De la tutplaneda brulo,
Ĝi estas jam en proksimo.
Nin savos neniu saĝulo,
Nin savos nur kontraŭstaro
Persista al la registaro.
Se strebas ĝi al milito,
Se por ĝi milito –
Profito,
Do nia respondo – nur spito.
Vivaj – ni volas vivi!
Mortu – milita morto!
Estu – hom-inda sorto!

Baldaŭ mi foriros el tiu kaĝ',
 La ĉagren' inundas en mia sin'.
 La mond' ne havas almenaŭ guton da saĝ';
 Mi ne ŝatas kaj ne agnoskas ĝin.
 La patrino rakontis pri blua land',
 Kie sonas kantoj de birda ĥor'...
 Kiel reprezentant' de l' danĝera band'
 Estos mi mortpafita post unu hor'.
 Vivi – estas sukcesi unua al gorĝ'
 Enkroĉiĝi kaj poste sin savi per fuĝ'.
 Vivi estas mensogi. Perfidi. Forges'
 Kaj obe' al pli fortaj – jen estas la leĝ'.
 Vipas politikistoj per fajfa skurg',
 Kontraŭ volo mi krias kun ĉies kri'.
 Stop! Mi plu ne obeos. Ektremu, burĝ'!
 Via rolo finiĝis en Histori'.
 Ni mortigis garantiulojn. En plena aviadil'
 Ni eksplodis bombojn, venĝante al mond' de sinistr'.
 Estis de ni forrabita la ĉefministr'
 Kaj prezident' pafita en propra aŭtomobil'.
 Ĝuis ni potencon super la pita ar',
 Iĝis nin fortaj kaj bravaj ilia tim'.
 Kiam subite trafis nin policikomisar',
 Por moment' mi embarasiĝis – kaj restis la sola viktim'.
 Jes, mi estas malforta. L' potencoj potencos plu.
 En maljusta mondo ankoraŭ unu maljust'.
 Jam neniam min malsekigos la pluv',
 Eble nur sango el kelkaj truetoj en brust'.
 Mi malkredis la mondon. La mondo mensogis min;
 Entute – remio. Estus mi deknauĵarul' en juni'.
 Nur mi volas, ke al neniu plu la patrin'
 Rakontu pri blua mondo, damnita, neebla por ni.

Kanto de neeŭropa homo de XXI jc.

Ho, Eŭropo!
 En XV jc vi bruligis viajn sorĉistinojn en la fajroj surplace. Mezepoko...
 En XX jc vi bruligis viajn civitanojn de ajna sekso kaj aĝo en la fornoj. Progreso!
 En XXI jc vi bruligas pneŭojn en la fajroj surplace. Degenero.
 Ho ve, Eŭropo, Eŭropo!
 Kien vi ruliĝas tiel senbride, kiel brulantaj pneŭoj? Kio atendas vin fine de deklivo?
 Neniu respondas.

Makaronioj kaj brasiko

Svetlana Gasjuk (Tuapse)

Li edziĝis pro grandega amo malgraŭ la kategoria “kontraŭ” de liaj gepatroj. Ŝi estis judino! Ŝia familio loĝis en ĉambreto de komuna loĝejo por kelkaj familioj. Kio estis plej konsterna, tie (en la juda familio sed ne en la komuna loĝejo) oni ŝatis brasikon. Ili konsumis ĝin ĉiutage: rostitan, bakitan, frititan, fermentigitan. El ĝi ili preparis salatojn; manĝataj estis ne nur brasiktrunkoj sed ankaŭ krudaj folioj. Najbaroj miris, ke brasiko en la juda familio estis preferata kontraŭ tradiciaj naciaj manĝaĵoj el kokino aŭ fiŝo.

Post la filina edziniĝo la gepatroj cedis sian ĉambreton al la novgeedza paro kaj mem transloĝiĝis en apudan vilaĝon al parencoj. Kutime tre kvieta “komunumo” iĝis atestanto de treege bruaj kvereloj kaj disputoj, kiuj komenciĝis ĝuste sekvantan tagon, kiam la junaj geedzoj restis solaj. Lacigita edzo post laboro revenadis hejmen malsata. Por vespermanĝo lin ofte atendadis makaronioj kun brasiko. Tio kolerigis lin, ĉar li ŝatis viandon, ĉiutage viandon! Sed la edzino eĉ odoron de viando ne povis elteni. Bonkoraj najbaroj helpis al la junulino kiuri ion viandan: kotletojn rosti, batmoligi viandpecojn, ili ofte regalas la junajn geedzojn per siaj manĝaĵoj.

Post du jaroj ili divorcis. La junulo revenis al siaj gepatroj. Sed ŝi, ricevinte la ateston pri eksedziĝo, revenis en la komunan kuirejon, metis tiun papereton sur la tablon por ĉies tralego kaj trankvile enlitiĝis. Sekva tago estis dimanĉo. Frumatene je la sepa horo ĉiujn loĝantojn de la komunumo vekis longa sonoro. Kun granda bukedo de floroj, feste vestita, kun kravato kaj akompanata de amiko, aperis eksedzo kaj en la muta ĉeesto de ĉiuj najbaroj petis sian amatinon reedziniĝi. Tiel daŭris la tutan jaron: ĉiudimanĉe estis sonorado, floroj, kravato, amiko kaj propono reedziniĝi. Finfine ŝi demandis: - Se ni regeedziĝos, mi denove vin nutros ja per makaronioj kaj brasiko. Ĉu ne la samon ni ripetos? Sed li obstine respondis: - Mi deziras makaroniojn kun brasiko. Ŝi rifuzis.

Post kelka tempo ŝi edziĝinis kaj elmigris en Israelon. Li edziĝis al unua renkontita fraŭlino, kiu estis samnoma kiel lia eksamatino...

* * *

Sesdek jaroj pasis. La najbaroj disiris al novaj loĝejoj kaj aliaj urboj, tamen ĉiuj subtenadis kontaktojn per leteroj, telefono, invitadis kaj gastigis unu la alian. Ili rememoradis la junan paron kaj la rimarkindan jaron kun floroj, kravato kaj amiko. Iutage unu el eksaj najbaroj, vizitante paĝojn de la socia reto “Samklasanoj”, rimarkis konatan familian nomon. Sur la malfermita persona paĝo estis li! Romantika fraŭlo kun floroj, kravato kaj amiko! Kaj en lia respondo al persona demando pri la ŝatata manĝaĵo estis indikitaj makaronioj kun brasiko.

Feĉulo

Esperpore (Karaganda, Kazahio)

Malantaŭ pordo de la direktoro eksonis ies laŭta voĉo:

– Fekegon al viaj kapoj! Merdon! Mi penas ekspliki al vi jam dumeterne. Ĝi simple ne povas manĝi tion. Ne povas manĝi! Ĝi rigardas al via fiaĵoj, same kvazaŭ ili tute forestus. Trae. Pli-malpli tiel...

Sekretario, tre juna virino, decidinte eniri, malfermis la pordon kaj ekvidis kiel iu longbarba kaj longgara homo kun iom frenezaj okuloj, vestita je bruna malpura leda jako kvarpiediĝis apud la fenestro kaj faras teruregan mienon, direktante rigardon al la kafaŭtomato. Li ekstrabis, samtempe turnante okulojn jen dekstren, jen maldekstren en turmenta serĉo, kaj lia rigardo fariĝis kvazaŭ blinda, tuŝanta la vakuon. Krom tio, lia sovaĝe kurbigita buŝo efikis aldone timige.

– Kaj ĝi tute ne aliras! Ĉu vi povas kompreni tion? Tu-te ne al-ir-as! – li pasiege laŭte parolis: evidente, en la atendo ke tiuj vortoj iel plifortigos la ĵusan pantomimon. Rimarkeblis ke ia nervemeto jam komencis regi lin.

La sekretario konfuzite, en granda konsterno, flustris “panjo!”, hastis meti pleton kun kvar tasoj plenaj de la ĵus kuirita plaĉodora verda teo kun jasmeno kaj tuj foriris.

Dume, enspiriĝinte, la barbulo eltrovis novan argumenton:

– Tiu rubo ne estos manĝata, eĉ se priverŝi ĝin per densa tavolo de saŭco acidkrema, – la homo geste elmontris kiel oni povus tiel senespere kaj senrezulte priverŝi.

Tri uloj staris ĉirkaŭ la parolanto kaj atenteme, kun granda sincera intereso, aŭskultis lian monologon. Tio estis administranto, financa direktoro kaj ĉefdirektoro de la superbazaro, en kiu ĉio tio okazis.

Tamen, videble, estas bezonata iu same kronika rompo de tiu ĉi plumpa kroniko.

La parolanto estis ordinara senlaborulo, kiun ĉiuj nomis Feĉulo kaj neniu sciis lian veran antaŭnomon. Li estis metalulo. Kutima metalulo, iam ludanta en la grupo Mucida Milito. Malkutimaj kaj eĉ aparte eksterordinaraj estis nur liaj bizaraj tatuajoj: unu el ili, kiu troviĝis rekte subumbilike prezentis per si lertan portreton de li mem, kiu naze enspiris kokainon tra la tubeto de 100-stela monbileto, sur kiu estis skribite: “Ankaŭ ni rajtas!” Inter liaj “posedaĵoj” eblis trovi multon: nepagitan loĝejon, kiun li luis, dismuntitan nefunkciantan motorciklon, kokinon Kanabino kaj etan hundon, kiu tute ne havis nomon.

Antaŭ nelonge li aĉetis por tiu hundo, senrasa rufa estaĵo, kelkajn pakojn da mitulaj konservaĵoj, kies konsumada limtempo jam pasis. Tamen, la kaprica besto eĉ ne tuŝis la regalaĵon. Tial tuj sekvis ekstreme aĉabla peto al vendisto akcepti tiujn konservaĵojn, kiuj ankoraŭ preskaŭ tute ne estis tuŝitaj (tuta amaso!) kaj ankaŭ redoni la pagitan sumon. Post la kanajla rifuzo oni devis alvoki administranton, kiu rigardmezuris la barban klienton per siaj ruzaj suspektemaj okuloj kaj decidis simple irigi lin for sen ajna ekspliko. Sed Feĉulo ĝuste je tiu momento finis formi sian propran agplanon, kiu tute ne kongruis al tiu de la administranto. Li eksplode akcelis sin, ĵetante ĉiujn observantojn en la ŝokan staton, trasagis la ŝtuparon, multe bruegis en koridoro de la dua etaĝo per siaj botoj kaj intuicie eltrovis pordon de la financa direktoro, ulo sufiĉe inteligenta, – tiel oni povis konkludi post rigardo al liaj grandaj

okulvitraj. Li sidis en brakseĝo ĉe tablo kaj foliumis iujn paperetojn. Feĉulo alpaŝis lin, sed la sidanto daŭre okupiĝis pri siaj aferoj, neniel zorgante pri tia stranga kaj neatendita gasto.

– Mi volas ion montri al vi, – finfine konspireme okulsignis Feĉulo, rompante la silenton, kaj eligaĉis el sia dorsosako malbenitajn konservaĵojn rekte al la tablo.

– Kio estas tio? – la okulvitrulo spertis la invadon de la nekonato sen granda entuziasmo.

– Belmamaj knabinoj! Ĉu vi mem ne vidas?

– Nu... Ne, – okulvitrulo rigidiĝis kaj ne povis eĉ moviĝi pro tiu arogaĵo neimagebla eĉ en la teruraj sonĝoj.

– Mituloj, – Feĉulo fiere ekrigardis al la malsekaj kondensaĵ-plenaj pakoj kaj eltiris el tie ladvazon por montri.

– Mitulo estas vi. El kiu fabelo vi alflugis nin? Kial tiel fie fetoregas!?

– Ĝuste por tion pridemandi mi estas tie ĉi.

Dummomente ili senvorte rigardis unu la alian. Akvo el la pakoj jam formis etan riveron surtable kaj du krampoj komencis memstaran navigadon en tiuj torentoj. Ili nehasteme parade fordrivis laŭ preskaŭ tuta longo de la tablo kaj falis sur plankon. Kiu scias dum kiom da tempo estus eble kontempladi ankaŭ pliajn gutojn aŭ eĉ aĵetojn dezirantajn ekhavi la sorton de la krampoj, sed tio ne povintus daŭri tro longe.

Subite la okulvitrulo demandis, eĉ neatendite por si mem:

– Kial ili estas fridigitaj?

– Por savi la freŝecon, kompreneble! Ĉu vi tri jarojn aĝas? “Kial! Kial!”, – Feĉulo lipse imitaĉis la demandinton.

Estas malfacile imagi kio povus okazi post tio: la okulvitrulo je la tute klara morala bazo povintus alvoki policon kaj tuj enprizonigi Feĉulon por ia eksterkalkulebla periodo, kriegi kaj mansvingadi, almenaŭ alvoki la lokajn gardistojn kaj tiel plu. Sed iu Universa Kolapso okazis en la kapo de tiu financa direktoro. Tion oni povus diveni laŭ lia pala frunto plena de milmilo da malsankoloraj faltetoj kaj laŭ la ĵus velkinta staturo. Granda laboro estis plenumata en lia cerbo. Kiel ŝajnis al li tiumomente, li agis plejeble ĝuste. Li stariĝis, alpaŝis tre proksime al Feĉulo kaj feble eldiris:

– Ni iru al la ĉefdirektoro.

Sed Feĉulo faris eĉ ne unu paŝon. Anstataŭe li diris:

– Al mi ŝajnas ke vi ne konscias la tutan profundecon de la situacio...

Ĉe la financa direktoro tike ekmoviĝis la okulo.

Kelkajn minulojn poste Feĉulo jam provis konvinki la konstertitan duopon pri la neceso redoni la monon kontraŭ la malaltkvalita produktaĵo. Sed baldaŭ oni aldone alvokis administranton, kiu komence penis admoni ĉiujn ĉeestantojn pri tio ke li devas rekte nun zorgi iujn aliajn ekstreme gravajn aferojn, sed neniu aŭskultis lin, kaj li ĉesis admoni la aeron.

Post la kvarpiediĝo Feĉulo brile oratoris, anticipe plifortiginte sin per la teo, kiun li fortrinkis per unu guto. Sed ankaŭ la ĉefdirektoro, mezaĝa, kalva, ĉiam joviala homo nemalpli pasie strebis defendi sian personan opinion kaj konkludan juĝon de la tuta firmao (kiuj feliĉkoincide samis!) pri la koncerna punkto:

– Tio tute permeseblas. Ĝuste pro tio la prezo estas iomete pli malalta. Sed post nur unu semajno tio ne estas ankoraŭ veneno. Ĝi ne fariĝos veneno eble eĉ post unu jaro! Eĉ la Medicina Unio trovas tion sendanĝera.

– Ni faru eksperimenton, – replikis Feĉulo.

– Kiun eksperimenton?

– La eksperimenton, kiu permesos elmontri vian malhonestecon.

– Komprenu, sinjoro, ke ne estus tre oportune...

Sed Feĉulo jam eltiris el dorssako la sennoman hundon. Ĝi timeme okulumis kaj tuj konfirmis sian ĉeeston per granda flava flako aperinta apud piedoj de la eksperimentantoj.

– Se la mutuloj estos formanĝitaj, vi plene repa...

– Sufiĉe! – la ĉefdirektoro tro rapide rezignis je la defendo de sia starpunkto, kaj Feĉulo eĉ ne sukcesis eltiri bovlon, nek malfermi ladaĵon.

Plejverŝajne, al tiu kontraŭdira decido fare de la esro multe favoris tiu fakto ke tiu dolĉanima kalvulo dum pasio de la konversacio malsingardeme enpaŝis la senliman urinan lagon (li volis enŝovi la hundon tien, el kie ĝi estis eltirita), ekglitis, falis kaj lia multekosta nigra kompleto kaj silka blueta ĉemizo senrevene definitive damaĝiĝis.

– Vi ja ricevos ian monsumon. Ĉio laŭleĝe. Kion plie vi deziras?

Feĉulo enpensiĝis.

– Kaj kio pri la botelo da kanaba oelo, kiun mi aĉetis same ĉe vi? Mi intras mian Kanabinon per kanabaj grenoj kaj mia ovaĵo ĉiam estis alte taksataj de miaj amikoj. Dieca plado! Mi volis eĉ plifortigi la efekton per tiu oleaĉo, sed ve! Anstataŭe mi havas la senton, kvazaŭ mi plandumon dentumus, – tiradis la barbulo.

Al la ĉefdirektoro estis neeble rigardi sen kompatato, sed ankaŭ sen rideto. Ŝajnis ke li tute malsekis kaj eblis pensi ke li eventuale povas pritrakti ankaŭ tiun duan plendon malprofite al si kaj kontentigi Feĉulon.

Sed ĉio solviĝis poio. Oni elkondukis Feĉulon kun lia hundeto en manoj (kaj ian monsimon li vere poste ricevis), ien forkuris la estro-malbonŝanculo, kaj nur la financa direktoro tike movis per okulo kaj rigardis malproksimen, evidente en la peno pricerbumi tiun absolute novan mondkoncepton, kiun li akiris hodiaŭ.

Historio

Esperanto en la Ruĝa Armeo

Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburgo)

Esperanto estis tre disvastigita en Rusia imperio. Laŭ Adresaro eldonita en 1912 oni konsideris pri 4000 esperantistojn. Certe la komenciĝinta Unua Mondmilito serioze subfosis E-movadon, tamen ne entombigis ĝin. Laŭ paĝoj de la Esperanta gazeto *La Ondo de Esperanto* ni povas konstati, ke Esperanton oni ne nur propagandis inter militkaptitoj, sed instruis. Krome, en diversaj militkaptitejoj estis spertaj esperantistoj. Sube



estas prezentitaj fragmentoj laŭ la Esperanto-gazeto:

1915. Blagoveŝĉensk. En 1915 unu esperantistino, ĵus traveturinta Transsiberian fervojon, komunikas, ke inter multaj renkontataj militkaptitoj ŝi ofte vidis fremdlandajn esperantistojn, kaj kun kelkaj el ili ŝi interparolis Esperante.

Astraĥano. Ĉi-tie loĝas kiel civila militkaptito maljuna esperantisto s-ro Füller (aŭstria civitano), kiu donacis al biblioteko de Astraĥana Societo Esperantista kelkajn esperantaĵojn.

Ivanovo-Voznesensk. Inter militkaptitoj de nia urbo troviĝas esperantisto Josef Steiger, el Bohemujo.

Kazan. Aŭstria esperantisto Tadeuŝ Kacieĉak, civilkaptito el Lodz, aranĝis Esperantan kurson por ĉi-tieaj civilkaptitoj-poloj. Necesaj pollingvaj lernolibroj estas jam akiritaj.

Ĉita. Militkaptito de Aŭstria armeo S-ro Taubmann, estinta redaktoro de "La Marto", gvidas kurson por militkaptitoj. Partoprenas 12 personoj.

Taŝkent. S-ro A. Bانونczŭ – militkaptita oficiro hungara organizis Esperantan kurson por militkaptitaj oficiroj hungaraj.

1916. Ĉita. S-ro Taubmann, aŭstria militkaptito, skribas al ni. "Nun mi ne plu estas sola: jam la train Esperantan kurson mi nun gvidas kaj precipe la nuna faras al mi grandan ĝojon, ĉar la sukceso min plene kontentigas. Ĉiuj el la instruatoj fariĝis pioniroj de nia afero. Nun mi instruas oficir-aspirantojn (16). Ankaŭ s-ro Glaŭz, mia ĉi-tiea lerninto, gvidas samtempe kurson en alia kazerno. Ni semu kaj semu!"

Kirsanov (Tambova gub.). Tie ĉi estas kunigitaj 2500 italo-aŭstriaĵoj militkaptitoj. Inter ili mi trovis kelkajn samideanojn, kiuj interesigis pri Esperanto aŭ antaŭ la nuna militego aŭ estante jam militkaptitoj en Rusio. Ni propagandis Esperanton dum la vintro inter niaj kunsuferantoj, sed ne havinte lernolibrojn ni nur malmulte povis diskonigi altajn celojn de nia lingvo. Fine mi sukcesis ricevi de mia angla korespondanto adreson de Moskva Delegito de UEA. S-ro Ŝabuneviĉ, kiu afable venigis al ni diversajn librojn, gazetojn kaj propagandilojn. Ni komencis post alveno de tiel karaj senditaĵoj lernigi laŭpove, sed loĝante en malsamaj ejoj, havante nur unu lernolibron kaj povante nur malfacile interrilati, ni ne multe atingis. Lastatempe, post klopodoj de la loka komandanto, ni ricevis la permeson forlasi la kazernojn por kunveni en alia kazerno al la tie starigota kurso.

La kurson enskribiĝis pli ol cent kaptitoj, sed pro malvasteco de lerneĉambro, estis akceptitaj nur 42 personoj, la plej promesantaj.

La 7-an de majo estis malfermita ĉiutaga kurso, kiun majstre gvidas instruisto s-ro F. Taŭfer.

Ni bedaŭras la mankon de samideanoj en Kirsanov inter ĝiaj loĝantoj. Ni ĉiuj dankas kore s-ron Ŝabuneviĉ kaj s-inon N.P. Ĵitkova, ambaŭ el Moskvo, pro la senditaj libroj kaj ĵurnaloj, kiuj estas al ni tre karaj kaj interesaj. *G. Travaglia, militkaptito, V-a roto, en Kirsanov.*

Kirsanov (Tambova gub.). –S-ro Travaglia sciigas nin, ke post aranĝo de la kursoj, pri kiuj estis presite sur paĝo 52 de 88-89 numero de “La Ondo”, nun jam 100 italo-aŭstriaĵ militkaptitoj lernis nian lingvon.

Manskribatan Esperantan ĵurnalon “Irkutska Esperantisto”. La ĵurnalo estis redaktita de s-ro N.Ĥrebtovskij kaj dum someraj monatoj aperis tri numeroj.

Caricin (poste Stalingrado, nun Volgogrado). Post longaj klopodoj mi sukcesis atingi la ĝuon, pri kiu mi nun povas skribi al vi je l' nomo de Esperanta kurso inter militkaptitoj hungaraj. Ĉar la loko en nia kaptitejo estis netaŭga por la lernado, ni petis la estron de militkaptitoj, por ke li donu al ni ĉambron, en kiu ni povus silente kaj kviete lerni Esperanton. La militkaptitejestro akceptis nin bonkore kaj sindone rekomendis al ni apartan loĝejon en la urbo, kie nun ni estas. La nomon de la brava homo mi ne scias, do ne povas ĝin sciigi. *Francisko de Kocaŭi.*

La militkaptitoj restis en Rusio eĉ post la Oktobra revolucio kaj fino de la Unua Mondmilito.



Shamil Usmanov

Ekzemple **Ŝamil Usmanov** (1898-1937) tataro klasikulo, verkis kolekton da rakontoj pri la intercivitana milito en Rusio *La vojo de Legio* (trad. el tataro, 1975). En la libro Usmanov plendas: “...En la legio 1200 da batalantoj... La unua, dua kaj tria rotoj konsistas el hungaroj, la kvara el germanoj, la kvina kaj la sesa el tataroj, sed la sepa – el batalantoj de diversaj naciecoj: baŝkiroj, uzbekoj, kazaĥoj, ĉeĥoj, rumanoj, serboj kaj poloj”. Sed Usmanov trovis solvon de interkomunikado en la legio. Li rimarkis ke grupo de diversnaciaj soldatoj vikle parolas per nekonata al li lingvo: ĝi estis Esperanto. Ŝamil Usmanov iĝos arda adepto de la lingvo. En 1929 li studas Esperanton, ekde 1931 li estas membro de CK SEU. Gvidis Moskvan Komitaton de SEU en 1930-32.

Krom la maloftaj hazardaj uzoj de la lingvo estas almenaŭ du ekzemploj pri deviga studo de Esperanto.

Kriŝjan Ĵubit (*1895). N: latvo. Vilaĝa instruisto. Partopreninto en la Unua kaj Dua Mondmilitoj, en la Granda Oktobra revolucio. Li



Kriŝjan Ĵubit



rememoras: “Komence de la 1920-aj jaroj por la 25-a Ĉapajev-divizio venis ordono studi E-on. La ruĝarmeanoj studis la lingvon dum du jaroj po 2 horoj ĉiusemajne”. (revuo *Ogonek*, 1988/8, p.4). La Esperanto-instruisto estis Kriŝjan Ĵubit.

La duan ekzemplon donis **Isaj**

Dratwer (1905–1985). N: judo. Estonta bakteriologo rememoris pri la komenco de la 1920-aj jaroj. En 1921 li, loĝante en Mogilev (Belorusio), kun lokaj esperantistoj surgluis afiŝojn pri Esperanto. Por la unua porkonatiga vespero estis preskaŭ perforte venigita taĉmento da militistoj, tamen la enkonduka prelego bone okazis.

La celo de la instruado de Esperanto en la Ruĝa Armeo estis sufiĉe konata. Laŭ Leo Trockij la Ruĝa Armeo devas liveri la revolucion en Eŭropon per la bajonetoj. La ruĝarmeaj esperantistoj trovas subtenon de



Isaj Dratwer



trovas en ruslingva literaturo.

eŭropaj esperantistoj kaj helpas neniigi imperiismon. Tamen la Ruĝa Armeo sub gvido de Miĥail Tuĥaĉevskij malvenkis en Pollando. En la Ruĝa Armeo oni komprenis, ke eksporti revolucion estas malbona ideo, ĉar la industrioj de Sovetio kuŝas en ruinoj. Post kiam Stalin forpelis Trockij-on el la Ruĝa Armeo, Esperanto ricevis tute taŭgon destinon: informi la tutan mondon pri atingoj en lando de laboristoj kaj kamparanoj. En la 1920-30-aj jaroj estis populara Proleta Esperanto-Korespondado (PEK). Unu ekzemplon de la korespondado ni


Esperanton uzis en sia korespondado lernantoj de militlernejoj de Germanio kaj Sovetio dum la intermilita periodo 1922-1933. Pri tia korespondado mencias en sia libro **Aleksej Lobačov** (1903-1964). N: ruso. Adoptita filo en vilaĝana familio de vilaĝo Zonino, Kaluga gubernio. En 1923 Lobačov finis la 1-an Unuigitan lernejon de komandantaro. En sia ruslingva libro *Per malfacilaj vojoj* (1960) Lobačov rememoras sian lernadon en la Sverdlov-Akademio: “Mi korespondis kun kursanoj de germana marksista laborista lernejo. Ni korespondis per la germana kaj Esperanta lingvoj. (La arta internacia lingvo tiam estis sufiĉe vaste disvastigita en Sovetio, ekzistis eĉ CK de SEU, en kia mi reprezentis universitatan sektion). La leteroj de eksterlandaj amikoj estis publikigataj en ĵurnalo *Sverdlovija*. Jen estas unu el tiuj leteroj, aperinta la 28-an de majo 1932: «Nia lernejo, – skribis kursanoj de la berlina marksista laborista lernejo, – estas fondita en la 1926/27 lernoĵaro, kaj ĉiujare kvanto da studentoj kreskas. En 1931/32 lernoĵaro ĉe ni studas preskaŭ 8000 studentoj. La lernejo estas la sola altlernejo de la komunista partio kaj havas 30 filiojn en Hamburgo, Lepsiko, Breslaŭ kaj aliaj grandaj urboj de Germanio. La lecionojn oni instruas vespere en 28 distriktaj lernejoj, en ĉiuj ĉefkvartaloj de la Granda Berlino. Ni sendas al vi unu ekzempleron de nia lernoprogramo por 1931/32 lernoĵaro, ankaŭ po 1 ekz. de la lerneja gazeto *Marksist’*».

Laŭ la supre prezentitaj ekzemploj ni povas konstati ke Esperanton oni vigle uzis antaŭ la Unua Mondmilito, dum kaj post fino de la milito.

Recenzo

Kartvelio 1918-21 kiel nova mito pri “ora epoko”

La libro de Eric Lee “La eksperimento. La forgesita revolucio de Kartvelujo 1918-1921” traktas kelkajn diversgrade forgesitajn historiajn eventojn el la epokoj de la 1-a kaj 2-a Rusaj revolucioj. La centro de la libro estas dediĉita al la memstara Kartvela popola respubliko dum la 2-a Rusa revolucio, kiun la aŭtoro opinias la plej aŭtentika ekzemplo de demokratia socialismo dum la tuta homara historio. Pri tio ni parolu pli detale, sed multe pli forgesita nuntempe estas alia epizodo, kiun la aŭtoro konsideras provludo al la ĉefaj eventoj – Guria respubliko, t.e. teritorio de popola memregado en unu distrikto de Kartvelio dum la 1-a Rusa revolucio.



Vere, la eventoj en 1905-a-06-a jaroj estis tiom buntaj kaj rapide ŝanĝiĝantaj sur grandega teritorio de la Rusia imperio, ke malgranda Guria distrikto proksime al la imperia rando plene perdiĝas en la memoro. Tamen tio, kio okazis tie, kiel insistas la aŭtoro, laŭ sia signifo kaj profundeco multe superas la faman Parizan komunumon de 1871. Tie la loka loĝantaro sukcesis establi memregadon kaj socian ordon, tre proksiman al elementa socialismo: la ĉefa gvida organo fariĝis ĉiusemajna popola kunveno en ĉiu vilaĝo, kaj ĝiaj funkcioj kunigis la leĝodonan, plenuman kaj juĝan branĉojn de la povo. El sporadaj popolaj tumultoj en 1902-04 jaroj en 1905 formiĝis forta strukturita respubliko kun armitaj sindefendaj taĉmentoj, kiun oni sukcesis subpremi nur per granda milita forto post sufiĉe longa ekzistoperiodo (multe pli longa kaj kun multe pli da pozitivaj atingoj ol de la Pariza komunumo...). Pli konscia kaj sinsekva la kamparana respubliko fariĝis pro intima kunlaboro kun la lokaj social-demokrataj komitatoj, kaj ne nur la kamparanoj lernis ion de la konsciaj marksistoj, sed ankaŭ la marksistoj multon lernis el la praktika agado de la ribelintaj kamparanoj – ankaŭ por la estonto, kaj, laŭ la opinio de la aŭtoro, la ĉefaj sukcesoj de la kartvelaj social-demokratoj dum la dua Rusa revolucio ŝuldas al la Guria instruo. Kaj inter tiuj sekvoj estis granda aŭtoritato de la socialdemokratia partio ne nur inter la urbaj laboristoj kaj intelektuloj, sed ankaŭ inter kamparanoj, kio en industrie ne tro evoluinta regiono estis precedenco ekskluziva. Mi nur notu, ke tiu ordo en Guria respubliko, kiun priskribas Lee, pli similas al idealoj de kamparanaj anarĥiistoj, ol al tiuj de marksistoj.

Kiam komenciĝis la 2-a Rusa revolucio de 1917, en Kartvelio, diference de kelkaj aliaj etnaj regionoj de la Rusia imperio, ne ekzistis fortaj separismaj tendencoj. Tamen, pro la eventoj en la ĉefurboj kaj centraj regionoj de la lando, pro komenciĝinta tie furioza civitana milito, Transkaŭkazio entute, kaj Kartvelio aparte, fariĝis izolita, kaj la sendependeco falis en manojn de ties gvidoroj sufiĉe neatendite. Kaj la povon en la lando kaptis la socialdemokratoj, kiuj havis netan subtenon de la loĝtaro de 70 ĝis 80 %. Havante tian subtenon, troviĝo de la socialdemokratoj ĉe la pinto de la potenco en la lando estas tute natura afero.

Necesas rimarki, ke influo de aliaj socialismaj partioj en Kartvelio estis preskaŭ neglektebla, same kiel kontraŭdiroj interne de la sola marksisma partio. Do, agado de socialistoj-revoluciuloj, bolŝevistoj ka., malpli signifaj tendencoj, tie tute ne tiom gravis, kiel en la cetera teritorio de Rusia imperio. (La etikedo “menŝevistoj”, kiun aplikis al ili rusiaj bolŝevistoj, ne estas tute korekta, ĉar ene de Kartvelio mem influo de bolŝevistoj estis ne tro signifa, kaj ili tie ne deveins el la iam komuna unueca partio, kiel okazis en Rusio. Bolŝevistoj venis al Kartvelio kiel jam formiĝinta aliloke ideologia tendenco.) Tiu ideologia kaj politika unueco permesis, kiel opinias la aŭtoro, krei en Kartvelio unikan eksperimenton pri establo en la lando sistemon de demokratia socialismo, imago pri kiu hantas antaŭ socialistoj dum jarcento, sed kiu neniam kaj nenie realiĝis – krom, kiel insistas E. Lee, en tiu transkaŭkazia lando dum tri jaroj.

La libro estas apologia rilate al la tiama kartvelia reĝimo kaj al ĝia ĉefo Noe Ĵordania (aliaj gravaj kartvelaj social-demokratoj, eĉ tiuj, kiuj ludis en certaj periodoj gravan rolon en Rusio, kiel Ĉheidze kaj Cereteli, estas nur sporade menciataj). La atingoj estas ofte troigataj, kaj la mankoj kaj misoj malpliigataj – tamen el la priskribitaj faktoj, se oni abstraktiĝas de tiaj troigoj, eblas rekonstrui sufiĉe objektivan bildon.

Laŭ la aŭtoro, la reformoj, kiuj okazis en Kartvelia demokrata respubliko dum ĝia ekzisto, havis ĝuste socialism-demokratian karakteron: ili strebis al justa solvo de agrikultura demando, kreo de miksitaj ŝtate-privata eknomio, liberaj eksterpolitikaj

sindikatoj kaj subtenon de ĉiam kreskanta kooperativa movado. La Konstitucio, zorge ellaborita (kaj definitive akceptita nur en la lastaj tagoj de la memstara ekzisto de la demokratia respubliko) estis modela kaj plej evoluinta en ĉiuj demokratiaj vidpunktoj por tiu tempo.

Estas ioma kontraŭdiro inter ebleco de ekzisto de demokratia socialismo en la lando, kie $\frac{3}{4}$ de la loĝantaro estis kamparanoj, kaj la industria evoluo estis en ĝerma stato. La reganta marksisma partio tion devis kompreni, kaj, evidente, ne akcelis tro la socialismigon de la tuta ekonomio, celante tion post signifa modernigo kaj industriigo. En tiu senco la kartvelaj social-demokratoj samopiniis kun bolŝevistoj en la periodo de NEP (Nova Ekonomia Politiko), kiu regis en Soveta Rusio kaj USSR inter 1921 kaj 1928. En kio ili ja diferencis, estis sistemo de demokratiaj balotoj, kiu en Kartvelio en 1918-21 ĉiam ekzistis (nu, tamen, dum certa tempo la bolŝevistoj ja estis malpermesita partio!). Tamen, permesi opozicion en kondiĉoj de unupartia registaro kaj preskaŭ unupartia parlamento ne estas speciale aŭdaca demokratia atingo, ĝin tiuokaze eblas simple ignori...

La aŭtoro insistas pri humaneco de la kartvelaj social-demokratoj kompare al bolŝevistoj, pri principe paca karaktero de ilia regado. Nu, se temas pri skalo de kruelaĵoj dum la civitana milito en Rusio kaj eventoj en Kartvelio, tion diri eblas. Tamen la libro mem entenas faktojn, ke la kartvelaj social-demokratoj tute ne ĉiam estis nuraj humanistoj, sed tute pragmataj politikistoj, ĉar sen tio ili apenaŭ elvivus kiel ŝtatgvidantoj – tio videblas en iliaj rilatoj kun jen germanaj, jen britaj okupaciintoj, jen kun blanka armeo de Denikin (kaj tio ne estas riproĉo, nur konstato de la faktoj). Sed pli gravas iliaj militaj kunpuŝiĝoj kun najbaroj kaj internaj ribelantoj.

Pri la lasta afero necesas diri aparte. La plej mornaj epizodoj, priskribitaj en la libro, estas rilatoj de la social-demokrata registaro al la etnaj malplimultoj, fakte – kun tutaj regionoj, kie tiuj malplimultoj loĝis. Uzante kaj tiaman, kaj, des pli, modernan retorikon de la kartveloj, la etnaj konfliktoj en Kartvelio estis elvokitaj deekstere (legu: de rusoj). Nu, tiutempe la rusoj, okupiĝintaj pri intercivitana milito kaj spertantaj detruadon de ĉio en siaj teritorioj, apenaŭ povis kulpi pri iuj enmiksiĝoj en la internajn kartveliajn aferojn, sed la sama situacio, kiu elvokis strebon al sendependeco ĉe kartveloj, elvokis la samajn sentojn ĉe abĥazoj kaj osetoj, kiuj dum jarcentoj estis konsiderataj kiel ekspluatantoj kaj subpremitoj (en la Suda Osetio, ekzemple, la bienuloj-nobelaj estis kartveloj, kaj kampuloj – osetoj). Do, la klasaj konfliktoj ricevis evidente etnajn kolorojn, kaj strebo al emansipiĝo transformiĝis al naciaj ribeloj. Kaj la ribeloj estis subpremitaj senkompatate, kiel atencoj kontraŭ la demokratia respubliko. Dum sovetia epoko tiuj konfliktoj plejparte “brulis subtere” (kvankam iufoje pli akre riveliĝis), sed tuj post denova ricevo de kartvelia sendependiĝo en 1991 arde ekflamis...

Ĝenerale, malsukceso pace solvi etnajn konfliktojn – malgraŭ ĉiuj belaj proklamoj en oficialaj dokumentoj – estis la ĉefa kaŭzo de pereado de la kartvela “eksperimento”, eĉ se ĝi vere en ĉiuj aliaj rilatoj estis ekzemplo de demokratia socialismo. Lee mem sendezire agnoskas, ke demokratia Kartvelio, ĵus liberiĝinte de imperiaj katenoj, tuj mem ekkondukis rilate al siaj malplimultoj, kiel malgranda imperio.

La plej dubindaj konsideroj de la aŭtoro estas lia analizo de kaŭzoj de la subita ĉeso de la ekzisto de la Kartvela demokratia respubliko kaj okupo de ĝi fare de la ruĝa armeo. Li opinias, ke tio estis propra iniciato de Stalin (helpe de Orĝonikidze), kaj nek Trocki, nek Lenin sciis pri ĝia komenco, kaj nur poste devis agnoski ĝin *de facto*. La afero ŝajnas stranga – Stalin printempe de 1921 ankoraŭ ne havis povon, kiu permesus al li lanĉi iun grandskalan militan operacion (ĉionpova diktatoro li

fariĝis ne pli frue ol post 8 jaroj). Alia afero, ke Lenin povis komenci ĝin pro intenca misinformo, kiu troigis la militajn agojn kaj skalon de ribeloj en la regiono, kaj lanĉis ĝin por preventi pliintensigon de la konfliktoj. Ĉiuokaze, la ruĝa armeo treege facile, rapide kaj, ĝenerale, sen signifa sangoflue kaj granda rezisto, okupis la sendependan Kartvelion – kiun je unu jaro pli frue diplomatie agnoskis – kaj establis tie “sovetan potencon”. Aliaj landoj apenaŭ serioze tion protestis – ja neniu el ili Kartvelion agnoskis (la aŭtoro ne hazarde kun galo priskribas, ke la britaj komandantoj dum okupacio en 1919 rilatis al kartveloj kiel al sovaĝaj indiĝenoj), kaj en Ligo de Nacioj ĝi ne estis prezentita.

Mi opinias, ke facileco de la ruĝarnea okupo de Kartvelio eblis pro tio, ke en la popolaj amasoj la nacia sento ĝis la grado de nepra sendependeco dum nuraj 3 jaroj ankoraŭ ne plene enradikiĝis, kaj tiuj avantaĝoj, kiujn la sendependeco ĝis tiu momento donis – liberiĝo de de kampuloj de bienuloj, libera mastrumado, ebleco pri eta kaj mezgranda entreprenado, kreado de kooperativoj ks. – ne plu estis malpermesata ankaŭ de bolŝevistoj, enkondukintaj post fino de la interna milito anstataŭ severa milittempa komunismo NEPon. Kaj la klasa diferenco inter bolŝevistoj kaj socialdemokratoj, kiel sole regantaj partioj, ne estis tiom drasta, por ke oni risku sian vivon, defendante iun el ili. Cetere, granda parto de kartvelaj (kaj ne nur) social-demokratoj transiris al la bolŝevista partio post ties venko. Estis perdita la demokratia ordo – sed eĉ ĝi ankoraŭ ne ricevis ĉiujn formalajn trajtojn ĝis la fino de la ekzisto de la respubliko – ja Konstitucia asembleo akceptis la Konstitucion jam en Batumo, post fuĝo de la registaro el Tbiliso.

Cetere, la aŭtoro tre alte taksas ekskluzivajn demoktatajn kvalitojn de tiu Konstitucio de 1921. Vere, por sia tempo ĝi, verŝajne, estis tre bona. Kaj kiam en 1991 Kartvelio proklamis sendependiĝon, estis anoncita ekvalido de tiu Konstitucio. Sed... ĝi ial ne ekfunkciis normale, stabila potenco ne formiĝis, ekflamis etnaj konfliktoj... kaj en 1995 oni akceptis tute novan Konstitucion. Ĉu kulpas mankoj de la dokumento, aŭ simple la cirkonstancoj estis tiaj, ne tute gravas – tamen, se la Konstitucio vere estus tiom perfekta, la nova tute ne fariĝus bezonata (sufiĉus nur certaj ŝanĝoj).

Al mi ŝajnas, ke strebo trovi la idealan socion (kiel ajn ĝi nomiĝu – demokratia socialismo aŭ Regno de presbitero Johano – en iu politika praktiko de pasinto estas simpla nova provo krei miton pri iu ora epoko. Tamen tio ne estas afero nur vana – se ni fantazias pri aspekto de la ora epoko, ni komencas kompreni, kion ni ja reale volas havi!

Malgraŭ ĉiuj troigoj kaj prisilentoj, malgraŭ supertakso de iuj aferoj kaj subtakso de aliaj, peno de Eric Lee rakonti pri la “Kartvelia eksperimento” estas interesega kaj stimulas meditojn pri la ĉefa temo – kial ĝis nun en landa skalo nenie sukcesis por longa tempo “demokratia socialismo”? Eĉ se vere tiu sistemo, kiu naskiĝis en 1918-21 en Kartvelio estis ĝuste ĝi, kia sorto ĝin atendus en pli longa perspektivo (se ne venus la ruĝa armeo)? Ĉu ĝi evoluus al io pli socialisma, aŭ Kartvelio poiomete transformiĝus al ordinara burĝe-demokratia lando, kie regas ĝenerale kapitalisma ekonomio, kiel okazis al pluraj landoj kun social-demokratiaj registaroj? Respondoj povas esti malsamaj, sed mem restarigo de la demandoj estas valora. Tial apero de la libro en Esperanto estas grava por internacia publiko, kiu interesiĝas pri socialismo, marksismo, demokratio, anarĥismo kaj etnaj interrilatoj en ties ligo kun ĉiuj supraj aferoj.

Kaj fine kelkaj vortoj pri la Esperanta teksto. Bedaŭrinde, en ĝi estas multe da tajperaroj, inkluzive preterlasojn de vortoj kaj eĉ plenaj frazoj, kio iom stumbligas la legadon. La traduko mem estas flua kaj klara, sed ĉi tie indas fari jenan rimarkon.

Ĉar esperantigis la libron grupo sub gvido de Renato Corsetti, evidentas, ke ĝi estas farita en la “bona lingvo”, do, la landoj havas nomojn aŭ kun sufikso -uj- (Kartvelujo), aŭ tute ne havas indikojn (do, oni devas konjektadi, kion signifas la vorto “Kaŭkazo” – ĉu montoĉeno, ĉu landon, en kiu troviĝas la montoĉeno kun tiu nomo?). Forigo de neologismoj atingas tiun gradon, ke anstataŭ zamenhofa vorto “teroro” (kiu signifas certan politikan rimedon) estas uzata “teruro” (kiu, tamen, estas ja homa sento). Samtempe, la tradukistoj senhezite uzas neologismon “ostaĝo” anstataŭ tute komprenebla fundamenta “garantiulo”, ks. Mi ne opinias ĉion tion gravaj mankoj, simple notas, ke intensa strebo al “bona lingvo” ne ĉiam kondukas al plene sinsekvaj rezultoj.


Nikolao Gudskov

Eric Lee. La eksperimento. La forgesita revolucio de Kartvelujo 1918-1921. Tradukita el la angla de Renato Corsetti ka. Monda Asembleo Socia (MAS), 2018. 248 p. ISBN 978-2-36960-117-3 (MAS-libro n-ro 200)

Ĉirkjaŭ rido

La unua de aprilo

Vladimir Opletajev



La unuan de aprilo en la tuta mondo estas festata la Internacia Tago de rido, ŝercoj, mensogoj, trompoj, kiu apartenas al la plej ŝatataj kalendaraj tagoj, kiam homoj senbride kaj senmezure gaje petolas, amuzas kaj distras sin per ŝercoj, trompaĵoj, blagoj, mistifike mensogas unu la alian. En iuj landoj oni nomas ĝin Tago de stultuloj kaj malsaĝuloj. Kiam aperis ĉi tiu gaja kaj petola tradicio blagi kaj ŝerci en la unua aprila tago? Neniu povas nun precize respondi la demandon, ĉar multaj popoloj havas proprajn tradiciojn, ligitajn kun ĉi tiu tago, kaj nun ne eblas jam precize aserti la veran fonton de la populara blagotago.

Multaj hipotezoj ekzistas por retrovi ĝian originon. Mi nomu nur kelkajn: mitologia kaj biblia versioj; kalendara versio (transiro de la Julia al la Gregoria kalendaro); versio, rilata al la eŭropa mezepoka tradicio de printempaj karnavaloj; literatura versio (mencio de la blagotago en la mezepokaj verkoj de Geoffereŭ Chaucer (1392), Eloŭ d’Amerval (1508) kaj aliaj); pluraj naciaj versioj (ekzemple napola unuaaprila blago donaci fiŝeton).

Jen kelkaj nuntempaj tradicioj de la aprila tago de rido.

En Francio kaj Italio ĉi tiu tago estas nomata “Unuaaprila fiŝeto” (“Poisson d’Avril” kaj “Aprile Pazzo”). Oni fiksas ŝerce kaj kaŝe paperajn fiŝetojn unu al la alia sur dorson.

Slovakoj kaj ĉeĥoj havas en siaj lingvoj la esprimon: “Poslati koho z Aprilem”. Sed fakte en ĉiuj landoj sendi iun por trovi kaj alporti neekzistantan aĵon aŭ plenumi

stultan taskon estas tre populara blago. Ĉu iu el vi jam serĉis dolĉan aceton aŭ aĉetis kilogramon da klaroskuro?

En Rusio oni komencis festi la Tagon de rido en la 17a jarcento. Petro la Granda favore rilatis al diversaj blagoj dum ĉi tiu tago. Onidire en Sankt-Peterburgo ĝin provokis incendialarmo aŭdigita ĝuste la unuan de aprilo. Frumatene peterburganoj vekigis panike pro alarmsonorado, sed ĝi estis nur mensoga ŝerco.

En Moskvo la unua amasa blago okazis en 1703, kiam urbanoj estis invititaj al mirakla surstrata spektaklo. Sed la flankentirita kurteno de tabulscenejo vidigis nur grandan tolaĵon kun rikana surskribo “La unuan de aprilo neniun kredu!”

Tago de rido

Klara Ilutoviĉ



Sonas rido. Sprita vorto
Ĝojplenige kaŭzis ĝin.
Ies renkontata sorto
Fluis je la ridinklin’.

Oni ridas por ĉesigi
Vortojn de fanfaronad’
Kaj por nekredeme digi
Trompimp[resojn sen kompat’.

Rid’ kuracas kaj eĉ savas
Kiel kontraŭmorba brid’.
Esplorendan forton havas
Ordinara homa rid’.

Oni ridas por ne plori
Post faliga sortobat’,
Por vivami kaj memori
Ke ne ĉion regas fat’.

Ridofesto gaje pasu,
Ĝoje ridu la anim’,
L’ ekaprila tag’ ne lasu
Iun ajn en la deprim’.

Dum penad’, sukces’, misfido
Kaj en spica ŝercarom’
Vivu l’ multvizaĝa rido
Por plibono de la hom’.

Iom por ridi, aŭ, almenaŭ, rideti

Jen estas la paradokso: se vi estas pli saga ol ĉiuj, kiu tion komprenas?

Tiuj, kiuj elvivos, nomos ĝin “la malnova bona tempo”.

La registaro anoncis, ke la enspezoj de rusianoj ekkreskis. Mi kalkulis miajn enspezojn kaj komprenis: ni ne estas rusiano!

- Mia edzino ŝatas katojn kaj hundojn.
- Kiel vi bonŝancis! La mia ŝatas izatisojn kaj zibelojn.

La virino estas kreita por ke la viro ne mortu pro feliĉo

La Centra banko de Rusio emisiis moneron kun valoro “Unu minimum salajro”.

Viro indignite diras al najbarino:

- Forerenu vian hundon! Sur mi jam puloj saltas!
- Cezaro, foriru de la homo, ĝi pulojn havas.

La amo vivas tri jarojn La hamstro vivas tri jarojn. Dum enamiĝo aĉetu hamstron – ĝia morto estos la indikilo.

La avo gajnis milionon per loterio. Ĵurnalistoj petas lin rakonti pri siaj emocioj.

– Num kion mi povas diri? Mi ĝojas, ke nun mi ekhavis grandan amantan min familion.

- Ivanov, kio vi volas fariĝi, kiam el kreskos?
- Kosmonaŭto.
- Por fariĝi kosmonaŭto, necesas longe kaj bone lerni.
- Tute ne nepre. Ĉu Belka kaj Strelka longe lernis?

CERBE kaj KORE

n-ro 3 (71), aprilo 2018

Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 96

BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo

“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto

**CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi
ilin al Nikolao Gudskov nikolao@ŭandeĉ.ru .**

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino .12.04.2018